
# V



## VALEZO

Kantono en sudokcidenta Svislando franc- kaj germanlingva (franclingve: Valais, germanlingve: Wallis, laŭ PIV: Valezo, mallong. VS: 5225 km$^2$, 291'500 loĝantoj/2005. Ĉefurbo: Sion (germanlingve: Sitten, laŭ PIV: Siono)

Kompare kun la kantonoj Tiĉino kaj Grizono, kiuj kiel V. ofertas similajn kondiĉojn por la turismo kaj internaciaj rilatoj, Eo apenaŭ enpenetris la valezan kantonon, se oni pretervidas kelkajn esceptojn. La unua valezano menciita de la nomaro de la unuaj anoj de SES (februaro 1903) nomiĝis Jean Vernay, instruisto. En 1905 prelegis en Sion pri Eo iu Alf(red) Delacoste, kaj la gazetoj raportis pri tio. Ankaŭ laŭzanaj kaj ĝenevaj e-istoj, kiel s-ro Mallet, klopodis propagandi la lingvon en V.

Dum la 1930aj jaroj en Sierre/VS Eo-kursoj estis gvidataj de →Edouard Waldvogel (1893-1994), kiu tie laboris kiel pastro.

En Siono loĝas *Francisko Bommer* (*1921), ano de la Marianista Komunumo. Kiel peranto de IKUE li prizorgis ĝis la fino de la 1990aj jaroj la aferojn de *Svisa Katolika Unuiĝo E-ista* (SKUE), eldonante cirkuleron, kiu unuigis la manplenon de katolikaj e-istoj en Svislando. (vd. ankaŭ →Jules Gross / →Ido)

## *Henri VATRÉ*

*1908-1998*



V. estis ĝenevano kun franca deveno, kiu ĝis 1974 laboris kiel komizo kaj administranto de ĝeneva loĝeja kooperativo. Lia patro Simon V. (1888-1972) estis la aŭtoro de la signifa dialekta vortaro *Glossaire des patois de l'Ajoie et des régions avoisinantes* (Porrentruy 1943), do ankaŭ V. mem multe interesiĝis pri lingvaj, literaturaj, kulturaj kaj internaciaj temoj.

V. fariĝis e-isto en 1927 en Ĝenevo kaj 1931-32 kunlaboris en la ĝeneva oficejo de UEA kiel bibliotekisto. 1934-35 li laboris en la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto, kie li konatiĝis kun Gyula (Julio) Baghy, Kálmán (Kalomano) Kalocsay kaj Lajos Tárkony. V. estis ano de SAT (de 1935), membro de SES kaj gvidanto de pluraj Cseh-metodaj kursoj.

La ĉefaj kontribuoj de V. al la Eo-movado situas precipe sur la kampo de la Eo-literaturo, kiun li profunde konis. Kiel recenzanto, scienca analizanto, statistikanto kaj verkisto li agadis sur la sekvaj kampoj: regule li kontribuis per artikoloj, tradukoj kaj recenzoj al *Literatura Mondo* (dua periodo), *La Nica Literatura Revuo, Literatura Foiro, Esperanto* (UEA), *Dialogo, Iltis-Forumo* k.a; li kontrolis manuskriptojn kaj presprovaĵojn por la eldonejo Stafeto de Juan Régulo Pérez en La Laguna de Tenerife; li kunlaboris kun la korektoservo de KCE; li kompilis la en-hav-indeksojn por la monografio *EoeP* kaj verkis statistikajn artikolojn kaj bibliografiojn (ekz. *Bibliografio de la verkaro de Gaston Waringhien*. En: *Li kaj Ni, festlibro por Gaston Waringhien,* 1985). V. sporade mem originale beletris kaj poemis „ne abunde, sed despli esprimive, plej imago-tikle kaj sens-

ekscite“ (G. Kamaĉo en *Esperanto*, n-ro 1030), produktante ekzemple la poemaron *Disaj gutoj* (1988). V. kuntradukis*: Floroj de l’Malbono* de Charles Baudelaire (1957), *Nokta flugo* (1983) kaj *Tero de la homoj* (1985) de Antoine de Saint-Exupéry; li skribis libro-enkondukojn kaj verk-antaŭparolon al *Aventuroj de pioniro* de →Edmond Privat (1962), *La Mortsonorilo de Chamblay* (1983) kaj *Klaĉejo* (1987), ambaŭ de Karolo Piĉ; V. kunaŭtoris la ĉapitron pri la Eo-literaturhistorio en la *Gvidlibro por Supera Ekzameno* (1979), li redaktis kun →Reto Rossetti la duvoluman antologion *Trezoro, la Eo-novelarto 1887-1986* (1989), kaj sub la pseŭdonimo Henri Baupierre V. eldonis la libreton *Specimene* (1962) kun diversaŭtoraj parodioj kaj pastiĉoj, kaj lige kun siaj fakoj V. prelegis en diversaj e-istaj kunvenoj. Aparte atentindaj estas liaj literatur-teoriaj studoj, inter ili*: La socia romano en Eo* (prelego okaze de la 28a kongreso de la SAT-Amikaro en Laŭzano en 1973) kaj *Sur la marĝenoj de ‘Soifo’* de Tárkony (en: *István Ertl, Lajos Tárkony kaj la Budapeŝta Skolo,* kun kronologia bibliografio, 1990). Menciindaj estas ankaŭ liaj konsultlibroj *Neologisma Glosaro, Eta postrikolto al PIV* (4a eld. 1997) kaj *Vortstatistikaj esploroj* (1986).
Okaze de lia 80a naskiĝa datreveno (1988) aperis nur centekzemplere la omaĝlibreto *Speciale por Henri Vatré,* danka bukedo de literature tre originalece ellaboritaj gratulaĵoj fare de 16 eminentaj movadanoj. Modesta kia V. estis, kun la tendenco subtaksi la signifon de la propraj kontribuaĵoj, li devas esti konsiderata kiel unu el la plej seriozaj kaj kleraj esperantologoj, kiu akiris sian scipovon ĉefe per nelacigebla memstudado.
→Ĝenevo →UEA →Literaturo (beletra)




*Specimene* de Henri Baupierre

## *Juliette VATRÉ-BAUDIN*
*1910-1937*



Ankaŭ la unua edzino (1935) de →Henri Vatré, Juliette Baudin, kiu lernis Eon en 1930, estis Eo-poetino. Dum kelkaj jaroj la ĝeneva kudristino laboris kiel oficistino en la Internacia Centra Komitato de la Eo-movado (ICK) en Ĝenevo ŝi estis inter la kunfondintoj de la ĝeneva EG Zamenhof kaj 1933-35 gvidis Cseh-kursojn en diversaj nederlandaj urboj. Ŝi verkis originalajn poemojn, de kiuj kelkaj aperis en la libro *Naŭ Poetoj* (Iltis 1989), krome ŝi tradukis multajn poemojn el la franca kaj el la itala lingvoj, el kiuj kelkaj aperis en *Literatura Mondo* (dua periodo).
→Internacia Centra Komitato →Ĝenevo




## *VAŬDO*
Kantono en okcidenta Svislando franclingva (franclingve: Vaud, laŭ PIV 2002: Vaŭdo, mallong. VD: 3212 km$^2$, 653'800 loĝantoj/ 2005. Ĉefurbo: Lausanne (laŭ PIV: Laŭzano).

Kun Ĝenevo kaj Neuchâtel V. apartenas al tiuj kantonoj de Svislando, kie Eo plej frue ekprosperis. La unua nomaro de l’esperantistoj, aperinta en *Svisa Espero (SE)* 2/1903, menciis i.a. H. Bartenstein-Weith kaj Eugène Failletaz en Laŭzano kiel novajn adeptojn de la Eo-movado: entute 26 personojn el V. tiam anoncis sian intereson pri la zamenhofa lingvo. Kiel aliĝinton oni trovas en la dua nomaro ankaŭ la Societon de junaj komercistoj. Ĝuste el tiuj komercista-industriista, labo-


rista-fervojista medioj, sed ankaŭ el agrikulturaj, administraciaj kaj stenografiaj cirkloj fontis la unuaj adeptoj de la laŭzana kaj vaŭda Eo-movadoj. Dum la unua supre menciita persono restis nekonata, →*Eugène Failletaz* (1873-1943) eniris la historion de la svisa Eo-movado kiel unua prezidanto de SES; ĉi tiu asocio estis fondita en V.: en Rolle, hotelo Tête Noire, la 27an de septembro 1903, kie okazis la unua kunveno de SES; detala raporto pri tiu grava evento aperis en *SE,* n-ro 5/1903. (→Svisa Eo-Societo)

La konata e-isto *Henri Dor* naskiĝis en 1835 en Vevey/VD, kie li aktivis kiel okulkuracisto ekde 1860 antaŭ ol translokiĝi al Liono (Francio) en 1876, kie li post la apero de Eo prezidis la lokan ES kaj mortis en 1912. „Pro lia aĝo, lia boneco, la glorkrono de liaj blankaj haroj ĉirkaŭ nobla alta frunto, oni nomis lin 'la patriarko de la dua generacio de E-istoj', kiel notas lia biografio en *EdEo.*

El V. devenis ankaŭ →*Auguste Forel* (1848-1931), kiu restis en la memoro de la e-istoj kiel sincera apoganto de la ideo de la neŭtrala universala lingvo, speciale de Eo. Liaj loĝlokoj estis Morges kaj Yvorne.



Henri Dor kaj Armand Caumont



Eugène Failletaz, Auguste Forel, Henri Dor

Laŭ indiko en la revuo *Esperanto* (UEA), *Armand Caumont,* profesoro (aŭ instruisto) en Laŭzano, mortis en 1925 en sia 83-a jaraĝo. La samgeneraciano de →Ernest Naville, kiu aliĝis al la Eo-movado antaŭ la unua mondmilito, multe verkis kaj tradukis, ekzemple la romanon *For la armilojn* (1914) de Berta von Suttner, kaj en tiu tempo kunlaboris kun →Friedrich Uhlmann kiel Eo-redaktoro de *Monda Poŝto.* Dum la milito li helpis al la malsanema redaktoro de *Esperanto,* →Hector Hodler, kontribuante perartikole al lia revuo.

*Laŭzano:* La Eo-agado en V. komenciĝis kun kursoj kaj prelegoj en la komerca lernejo ĉe placo Chauderon, kie formiĝis la Eo-ĉelo de Laŭzano. Precipe la Popoldomo longe ludis la rolon de kunvenejo de la laŭzanaj e-istoj, fakte ĝis 1995.

La laŭzanaj e-istoj unuafoje kunvenis la 8an de marto 1903 en la ĉeesto de la eminenta e-isto Théophile Cart (1855-1931). Ĉi tiu verva apoganto el Francio publike elpaŝis pri Eo ankaŭ en Ĝenevo, Morges ktp. La *laŭzana* EG estis oficiale fondita komence de 1906 sub la prezido de s-ro *Du Pasquier,* komitatano de SES, kaj post ties baldaŭa foriro estis plutirita de *Edouard Mallet*, konata nomo ankaŭ en la tiama ĝeneva EG.

En 1909 en Laŭzano ekzistis eĉ du EG: la *Laŭzana E-ista Grupo,* estrata de s-ro A. Andréassian, ges-roj Paul Ketterer (instruisto en la blindulejo de Laŭzano), Armand Caumont kaj Fernand Bussy. La grupo kunvenis lunde, ĵaŭde kaj vendrede en la komerca lernejo ĉe placo Chauderon. La dua grupo estis tiu de la *Liberpensuloj-esperantistoj,* starigita de iu s-ro J. Eydelnanth. Poste la grupo alprenis la nomon EG *Frateco.*




SES-tago en Laŭzano en 1909. En la suba detalo klare rekoneblas Edmond Privat, Eduard Stettler, Hector Hodler kaj René de Saussure.



*SE* raportis en septembro 1909, ke en la jenaj laŭzanaj firmaoj oni parolas Eon: Berthon & Valat, kombistoj; Buffet de la Gare; fratoj Fleurdelys, bindistoj, Renens; Hotelo Ste-Luce, Instituto Jaccard, presejo Jaunin, librejo Sack, Mottier kombisto. En *SE,* oktobro 1909, aperis belega foto kun grupo de e-istoj farita dum la ĝenerala kunveno de SES en Laŭzano la 9/10ajn de oktobro (vd. supre).

En 1919 al la *laborista* ES Lausanne aliĝis *André Buttet* (+1972), frua svisa Eo-pioniro, kiu ĝis antaŭ la dua mondmilito gvidis kursojn kaj regule partoprenis Eo-renkontiĝojn. En 1945 *César Amaudruz* (1894-1975) en Le Mont s/Lausanne aliĝis al la Eo-movado. 1947-64 li partoprenis naŭ UK, la superan diplomon li ricevis en 1962. Amaudruz laboris kiel lignaĵisto, ĝardenisto, domservisto, terkulturisto kaj bovinbredisto. La UEA-delegito estis ankaŭ ano de la t.n. Internacia Frataro Kristana.




César Amaudruz kaj André Buttet

Alia grava aktivulo de la laŭzana Eo-movadeto nomiĝis *Paul Arbenz* (1908-1977), kiu laboris kiel dungito de la telefona administrejo en Laŭzano. Lerninte Eon en Winterthur/ZH, kie li vivis ĝis 1930, li rolis en la laŭzana Laborista ES kiel sekretario (1930-32), prezidanto (1933-36 kaj 1950-ĉ. 1976), kasisto (1938-44) kaj vicprezidanto (70aj jaroj), en la 30-40aj jaroj li administris ankaŭ la laboristan bultenon *La Semanto.* Dum iu periodo li redaktis ankaŭ la *Lozanan Informilon* kaj estis la esenca motoro de Eo-studrondoj. Pro tiuj meritoj la societo nomis lin honora prezidanto. Pri la Laborista EG Zamenhof ekzistas protokoloj inter 1929 kaj 1971 (CDELI). (→Laboristoj)
Kiel veterano kaj aktiva membro de la laŭzana EG *Zamenhof* estas memorinda →*Jules Freymond* (1888-1978). Kun *William Perrochon* (1899-1947), sekretario ĉe la ĝenerala direkcio de la svisaj fervojoj, li formis la grupon *Razude* en Laŭzano, kiu estis la kerno de SAEF. Ankoraŭ en la 1970aj jaroj oni

povis renkonti lin en la laborista ES en Laŭzano (→Fervojistoj).
En 1941 forpasis Ernest Cosandey, membro de la EG Zamenhof en Lausanne. En 1944 mortis R. Fulda (*1874) en Lausanne, de rusgermana deveno, dumviva membro de UEA, fervora admiranto de Andreo Cseh kaj de lia instrumetodo. Okupinte altan pozicion en sportaj kaj aviadaj medioj en Ruslando, Fulda elmigris al Berlino post la bolŝevika revolucio, kie li aktive partoprenis la Eo-movadon, kaj venis al Svislando post la kontraŭjuda ondo en nacisocialisma Germanio.



Paul Arbenz kaj Jules Freymond

En 1956 aliĝis al la Eo-movado →*David Buhlmann* (*1933) en Prilly/VD, nun emerita ceramikisto-muldisto, vegetarano kaj iama aktiva skolto kaj funkciulo de →Civilservo Internacia, kiu rolis kiel delegito de SAT, peranto de *SAT-Amikaro* kaj UEA-delegito. En la 1960-70aj jaroj li fidele kunlaboris en la laŭzana ES kiel protokolanto, vicprezidanto kaj prezidanto, redaktoro de *Lozana Informilo* kaj poste ankoraŭ kiel sekretario (ĝis 1992), pro kio la loka societo nomis lin honora membro.
Eklerninte Eon en 1964, →*Nicole Margot* (*1943), emerita instruistino en Laŭzano, partoprenis la agadon de TEJO kaj SEJ. Kiel prezidantino de la laŭzana ES ŝi komencis instrui la lingvon. En la 1980-90aj jaroj ŝi organizis la romandajn kulturajn semajnfinojn en Cully kunlabore kun la laŭzana ES, KCE kaj SES, kies estraranino ŝi estis (1989-2006).



Lucienne Dovat-Clément kaj David Buhlmann

Franco La Spina (*1954), kiu laboris kiel kelnero, masonisto kaj vendisto de legomoj kaj sekaj fruktoj, konsideris sin sennaciulo; li e-istiĝis en 1979 en Laŭzano kaj sekve aktivis en la laŭzana ES en plej diversaj funkcioj. Aliaj fervoraj membroj nomiĝas: Nancy Fontannaz (*1943), Françoise Badoux, Yvette Goy (*1927), ĉiuj tri estas emeritaj instruistinoj, Jaqueline Vasserot (*1949), Claude Blanc (*1947), Dum iu periodo *Lozana Informilo* estis redaktata de la geedzoj Jaqueline kaj Pierre-Henri Vasserot kaj de Nicole Margot, poste de Michel Roch. En la 1980aj jaroj la laŭzana ES estis prezidata de Malté Giovanoli.
En pli fruaj tempoj aktivis en Laŭzano kiel e-istoj ankaŭ François Mottet, kuiristo, Bertrand Pilloud, Antoine von Moos (*1924), Edouard Muster (UEA-delegito en Laŭzano en la 60aj jaroj), Alice Quaglia-Menz, Hélène Weiss (*1923), Rosa Vogt (1879-1948). La patrino de Jaqueline Vasserot, *Lucienne Dovat-Clément* (*1919), emerita instruistino, kiu loĝas en Renens/VD kaj e-istiĝis en 1955, apartenas al la →J.E.A.N.-movado ĉirkaŭ Marc Rohrbach, kies instrumetodon Rika metodo ŝi aplikadis. Dovat estas honora membro de la laŭzana ES kaj de SES (2005) kaj dumviva membro de UEA.
En 1981-83 estis eldonita →*Transalpa Esperantisto* kiel organo de Laŭzana Esperanto-Societo (LES) kaj Kooperativo de →Literatura Foiro (LF-koop).



Franco La Spina kaj Claude Blanc

*François Randin* (*1951), e-isto de 1995, kiu estas estrarano de la laŭzana ES kaj ekde 2002 ĉefdelegito de UEA por Svislando, laboras kiel filmisto kaj fotisto por la laŭzana polico kaj prizorgas la t.n. Esperantan filmkompanion de la laŭzana ES (Nandir).



Nicole Margot kaj François Randin

Ekde 2004 kiel prezidanto de la laŭzana ES oficas *Laurent Burgbacher* (*1976). La inĝeniero en komputiko esperantaniĝis en septembro 2002, lernante la lingvon per interreto dank' al brazila kurso kaj *Gerda Malaperis.* Burgbacher samtempe estas prezidanto de JES.




Nancy Fontannaz kaj Laurent Burgbacher

*Aliaj urboj kaj regionoj en V.:* En 1903 (4.2.) *Feuille d'Avis d'Avenches* raportis pri parolado de la neŭsatela e-isto →Edouard Ducommun en Avenches/VD, *Journal de Nyon* (18.3) kaj *Feuille d'Avis de la Côte* (10.3.) skribis pri prelego de la ĝenevano Théodore Renard en la Societo de l'junaj komercistoj en Nyon/VD kaj Rolle/VD. La unua nomaro de la e-istoj en *SE* 2/1903 menciis s-inon Schenk-Roessinger kaj f-inon *Alice Schenk* (1878-1939) en *Rolle,* kiu kun sia fratino *Cécile* organizis grupon kaj la unuajn kursojn kaj verkis gazetartikolojn (ekz. *Journal de Leysin*). C. Francina aktivis en *Nyon,* kie formiĝis EG kadre de la loka Societo de junaj komercistoj. Gustave Maillard agadis por Eo en *Vevey,* kie en 1910 estis fondita loka EG sub la gvido de la komizo Charles Balsiger. Poste la EG en Vevey estis vivtenata de la geedzoj *Karl* (1887-1966) kaj *Frieda Hiltpold-Weber* (1891-1984). Laŭprofesie Karl, kiu estis mekanikisto kaj aktiva naturamiko, estis krom ano de Universala Ligo multjara delegito de UEA en Vevey/VD kaj Corseaux/VD kaj prezidis la lokan EG en Vevey, precipe en la periodo 1921-40. Li partoprenis plurajn kongresojn, e-istajn kaj mondfederalistajn kaj subtenis la Moralan Re-Armadon. En 1972 la restantaj membroj de la EG Vevey estis krom Frieda Hiltpold ankaŭ Aldo Dutto, ĉar ĵus mortis Emmeline Maillard, kies fratino (?) Rose Maillard (1892-1964) iam estis fervora anino de la loka EG. Unu el la lastaj UEA-delegitoj en Vevey nomiĝis Edouard Pitton (1887-1964).


En 1905 f-inoj Hoffmann kaj Richardet kaj s-ro Yersin komencis Eo-kurson en Morges, dum →Edmond Privat mem prelegis antaŭ

300 aŭskultantoj en la kolegia aŭditorio de *Yverdon,* kie propra EG laŭ la nomo de Pestalozzi estis starigita fine de 1906 aŭ komence de 1907 kun prof. d-ro Paul Jomini kiel prezidanto.



Hélène Monod

En majo 1909 estis inaŭgurita Eo-domo en Morges/VD. Poste la EG *Morges* estis almenaŭ dufoje refondita: en 1913 de Hélène Monod (1871-1953) kaj en 1927 de la geedzoj Jayet. *Charles Jayet* (1881-1961) laboris kiel memstara komercisto (spicisto) dum ses jardekoj. Kiel e-isto de 1904/05, de 1908 li oficis seninterrompe kiel delegito de UEA en sia urbo, respektive de IEL dum la movada disduiĝo, kaj kiel gvidanto de la loka grupo. UEA kaj SES (1949) nomis lin honora membro, dum Jayet mem preferis nomi sin „simpla soldato en la verda armeo, kiu neniam perdis la esperon”. Lia edzino kaj sekretariino de EG Morges, *Jenny Jayet-Besson* (1883-1944), restis aktiva e-istino praktike ĝis sia morto. Eo ligis la paron dum 34 jaroj. La ĉerko de Jenny estis ornamita de verda stelo. Alia fervora aktivulino en Morges nomiĝis *Micheline Huber-Jaccard,* kiu aliĝis al la Eo-movado en 1927 kaj akiris la superan diplomon en 1928. Antaŭ ol ŝi eniris familian komercan entreprenon en Morges, kies sekcion ŝi estris dum 18 jaroj, ŝi laboris kiel oficistino ĉe la telegrafa-telefona entrepreno. Post edziniĝo (1935) kaj eksedziniĝo (1945) ŝi ree edziniĝis al la artpentristo Karl Huber (+1961). Huber-Jaccard, kiu partoprenis en 1932 la UK en Parizo, mem estis helpsekretariino de la 32a UK en Berno (1947). Krom tio ŝi estis membro de la ekzamena komitato de SES ĝis 1962, vizitis Ĉe-kurson en Arnhem kaj estis gasto de la londona EK. Ankaŭ la emerita instruisto Charles Knuchel-Palovaara (*1915) en Morges aktive uzadis Eon por turismaj celoj kaj ofte estis renkontebla ekzemple dum UK.



Charles Jayet (ĉ. 1954), Hélène Reymond kaj anoj de EG Morges




En 1922 s-ino A. Mexin fondis *infanan* EG en *Montreux.* La revuo *Esperanto* (UEA), n-ro 11/23, raportis pri la starigo de EG en *Renens.* Ankaŭ en *Begnins* aperis EG kun Gervaise Addor kiel prezidantino.
La ĉeesto de →René de Saussure en la vaŭda alpa vilaĝo Château d'Œx, kie li regule feriadis kaj kie li kutimis prelegi pri Eo kaj gvidi Eo-kurson antaŭ internacia partoprenantaro, kondukis eĉ al la formado de loka EG en 1910/12. Indas memorigi, ke →Hector Hodler frue mortis en 1920 en la kuracloko Leysin, kiu same apartenas al la vaŭda kantono.

En la vaŭda kantono, kiu estas relative granda kaj iom dissplitita laŭ regionoj, loĝas/is diversloke unuopaj e-istoj, kiuj pro geografiaj kaj aliaj kialoj ne havas la okazon viziti kunvenojn de societoj. Jen kelkaj nomoj:
Ekde 1945 la emerita instruistino *Hélène Reymond* (*1916), ), kiu lernis Eon en 1931 en Cernier/NE kaj faris la superan diplomon de SES por instrui Eon, estis delegitino de IEL en Bellerive/VD; en 1944 ŝi kunordigis la bibliotekan servon de SES; nun ŝi loĝas en Cerniaz/VD.
*Georgette Gaussen* (*1928) en Château-d'Oex/VD laboris multajn jarojn kiel sociala helpantino por orfoj en Francio; ŝi estas bahaanino kaj lernis Eon en 1980 en Laŭzano.
*Jean-Jacques Lavanchy* (*1934) en La Tour-de-Peilz/VD, emerita instruisto de metilernejo, fariĝis e-isto en 1969/70 sub la influo de la →J.E.A.N.-movado. Li aktivis ankaŭ en la komitato de la fonduso favore al la agadoj de la romanda teologo Charles Rittmeyer (1918-2002, kiu propraformule interpretis la evangeliojn kaj tial frontis sankciojn flanke de la vaŭda sinodo). Lavanchy estas membro de SES, dumviva membro de UEA (de 1973), estis vicprezidanto (1973-84) kaj prezidanto (1985-87) de KCE, kies Komisionon Eo lernejen li gvidis; ĉ. 1979-82 li oficis kiel svisa sekciestro de ILEI. Ankaŭ lia edzino Eliane Lavanchy-Purro (*1937), emerita instruistino en unuagrada kaj privataj lernejoj, havas konojn en la lingvo Eo.
*Nicolas Greber* (*1962), kiu devenas same de La Tour-de-Peilz, estis lernanto de Eliane Lavanchy en la 6a klaso en la baza lernejo. Kiam ŝi parolis al siaj gelernantoj pri Eo, Greber petis pri Eo-kurso. Sekve Jean-Jacques Lavanchy gvidis Eo-kurson al Greber kaj aligis lin al KCE. Elektinte la profesion de kuiristo-bakisto, Greber fariĝis la kuiristo de KCE/GEP antaŭ ol en 1992 forvojaĝi al Tucson/Arizono en Usono kun sia amerika edzino (kaj e-istino) Bonnie Fonseca.
En Villars-sur-Chamby/VD staras domo de la naturamikoj, kiu portas la nomon Frateco (artikolo pri tio aperis en *L'Est Vaudois,* 4.4.1990).



Jean-Jacques Lavanchy kaj Eliane Lavanchy-Purro



Nicolas kaj Bonnie Greber-Fonseca

Fine ankoraŭ unu signifa, sed forgesita e-isto kun iom tragika sorto estu menciita: En 1960 mortis en Vevey/VD *Henriko Fischer* (1879-1960), Eo-pioniro kaj siatempe unu el la plej maljunaj Eo-akademianoj, membro de SES kaj de la tiama EG Vevey. Post siaj studoj en Germanio Fischer ekkomercadis en Galați (Rumanio) kaj fondis grandan ES kaj Eo-presejon. En la UK li regule reprezentis la rumanan registaron kaj malavare oferis tempon kaj monon por Eo. Fischer, kies kunlaboranto estis Andreo Cseh, projektis kaj kuneldonis la revuon *Eo Triumfonta*, redaktatan de Teo Jung. Dum la dua mondmilito Fischer estis enkarcerigita kaj kondamnita al morto fare de la nacisocialistoj. Lia edzino pene sukcesis liberigi lin. Vivante mizere dum dek jaroj en ekzilo sur la insulo Kipro, ambaŭ geedzoj blindiĝis. Tiam Cseh kolektis monon por venigi la du blindulojn al Ĝenevo, kie pluraj operacioj redonis al ili certagradan vidkapablon. Depost 1950 la paro loĝis kiel

rifuĝintoj en La Tour-de-Peilz/VD. Tie la laboremo de Fischer por Eo reaperis kaj malgraŭ invalideco kaj maljuneco li dediĉis sin al la verkado.



Henriko Fischer

### *VIRINOJ*

En sia *demografia enketo,* kiun Tazio Carlevaro realigis inter 1994 kaj 1996 surbaze de 311 anonimaj demandiloj inter svisaj e-istoj, li eltrovis, ke rilate la sekson la svisan Eo-movadon reprezentas 52% de viroj kaj 48% de V. En la nomlisto de ĉi tiu enciklopedio, kiu reprezentas unuavice la aktivajn e-istojn, ĉ. unu kvarono estas V. Do la V. videble ludis kaj daŭre ludas gravan rolon en la svisa Eo-movado. Multaj viroj povis plenumi gravan poresperantan taskon, ĉar apud ili kunestis ne nur konsentema, sed kunlaborema ino, kiu kelkfoje eĉ anstataŭis sian edzon. La sekva listigo de multaj nomoj de V., kiuj aktive partoprenis la svisan Eo-movadon, dokumentu la virinan engaĝiĝon en tiu movado.

*Berthe Breguet* (+1954), membrino de SES kaj de la neŭŝatela EG, kaj *Amélie Montandon* el La Chaux-de-Fonds estis listigitaj inter la partoprenantaro de la 2a UK en 1906 en Ĝenevo. *Charlotte Pulvers* estis tre aktiva e-istino, kiu antaŭ la unua mondmilito agadis en la bazela regiono, kie ŝi rekonstruis la bazelan ES kaj fondis la EG en Sissach. En 1913 ŝi estis redakcia sekretariino de *Svisa Espero* kaj respondecis, kadre de ĝia LKK, pri la kongreslibro de la berna UK, krome ŝi havis literaturan intereson. En Davos, ➝Grizono, Eo estis propagandata de 1906 fare de la lingvo-instruistino *Emma Herzog* (+1920). En Neuchâtel la e-istino *Louise Perrenoud-Jeanneret* (+1951), la patrino de la posta e-isto kaj KCE-funkciulo René-William Perrenoud, kiu lernis Eon en 1903, funkciigis privatan lernejon, kie la fakoj franca lingvo kaj dommastrumado estis instruataj al fremdlingvaj junulinoj. ➝*Emma Chenevard* el Neuchâtel (+1939) estis frua kunlaborantino de SES antaŭ ol ŝi aliĝis al la reformprojektoj de ➝René de Saussure.



*Pionirinoj:* Charlotte Pulvers, Clara Haase, Alice Noguet



Emma Herzog, Jeanne Schmutz. Madeleine Vuille

En Berno gravan rolon ludis ➝*Hanni Fischer-Buri* (+1961), kiu aliĝis al Eo instige de la 31a UK (Berno 1939), kiu fariĝis prezidantino de la berna EG kaj LKK-anino de la laŭvica 32a UK (Berno 1947). Kun sia edzo ŝi estris la hotelon-restoracion Metropol, kiu servis ankaŭ kiel renkontejo por la lokaj e-istoj. Poste aperis la bibliotekistino *Gertrud Weigelt* (+1987), la apotekistino *Dora Hemman-Krebs* (+1994), la eksinstruistino *Anna Bertha Gerber* (+1996) kaj la restoraciestrino *Margrit Guldin* (+2006). En Soloturno aktivis por Eo en la 60aj jaroj *Doris Schmid* (*1921), kie ŝi restarigis la lokan EG.
Dum impona trideko da jaroj fidele kunlaboris kun la gvidorganoj de SES f-ino ➝*Lilly Schaerer* (+2001), jen kiel prezidantino (1957-60), jen kiel sekretariino, kaskontrolantino kaj kasistino (ĝis ŝia demisio en 1988). Ĝis sia pensiiĝo ŝi laboris kiel sekreta-

riino kaj librotenistino en teksaĵ-kolorejo en Langenthal/BE.

Fine de la 50aj jaroj aliĝis al Eo *Gertrud Eggenberger-Hohl* (*1925) en Winterthur/ZH. Ĉi tiu emerita sekretariino komerca nelacigeble funkciigis la svisan fervojistan Eo-organizon SAEF ĝis ĝia malfondo en 2004.




Louise Perrenoud kun sia filineto dum kostumbalo en Château d`Œx/VD (1913), kie Eo estis propagandata

Dum longa periodo la animo de la bazela ES estis →*Erna Döring* (*1920), kiu lernis Eon en la 20aj jaroj kaj rekomencis okupiĝi pri Eo denove ekde 1966. Post ŝia retiriĝo fine de la 80aj jaroj, la nova gvidantino de la bazela ES fariĝis *Nicole Béroud-Focke* (*1953), instruistino kaj pedagogino. Alia fervora e-istino en Bazelo nomiĝis *Louise Tissot-Martin* (+1963)

En Lucerno precipe *Lisel Lötscher* (+1965), *Annelies Dettling-Ammon* (*1925), *Renata Filali-Willi* (*1945), *Rosa Mettler, Louise Bachmann, Carla Müller* (+2002), *Charlotte Ecklin* (*2003) multe kontribuis al la loka ES.

Longjaraj membroj de EG St. Gallen nomiĝis *Lena Grütter-Häberli* (+1987), *Alice Früh* (+1985), kiu kunlaboris kun la redakcio de la →*Svisa Antologio* (1939), *Elsa Krobath* (+1988) kaj *Frieda Schmidheiny* (+1988), en Wil/SG *Hildegard Schoch* (*1926).

En Tiĉino *Etty Graeffe* (+1969) kunorganizis en la 60aj jaroj plurajn Eo-kursojn kaj aliajn aranĝojn. Alia signifa tiĉina e-istino, *Irene Molinari* (+1994), estis instruistino en mezaj kaj duagradaj lernejoj, membro de la lokarna EG kaj Eo-instruistino.

La laŭzanan ES konsistigas pluraj aktivaj V.: →*Nicole Margot* (*1943), *Nancy Fontannaz* (*1943), *Françoise Badoux, Yvette Goy* (*1927), la kvaropo estas emeritaj instruistinoj, kaj *Jaqueline Vasserot* (*1949); la ĉi-lasta estas la filino de *Lucienne Dovat-Clément* (*1919) en Renens/VD, kiu aktivis ekde la 50aj jaroj precipe kiel Eo-instruistino. *Hélène Reymond* (*1916), Cerniaz/VD, kiu lernis Eon en 1931, estis delegitino de IEL en Bellerive/VD.



*Intelektulinoj:* Heidi Baur, Ida Wittenberg, Juliette Vatré



*Fervorulinoj:* Hanni Fischer, Lilly Schaerer, Doris Schmid



*Kulturemulinoj:* Anita Altherr, Madeleine Stakian, Andrée Gacond

Pluraj e-istinoj, ekzemple *Lucienne Dovat-Clément* (*1919), *Danièle Bignens-Volpé* (*1930). *Mathilde Lüthi, Gisèle Weill-Schneck* (+2004), originis/as el la J.E.A.N.-movado. La bahaanino *Georgette Gaussen* (*1928)*,* kiu lernis Eon en 1980 en Laŭzano, laboris multajn jarojn kiel sociala helpantino. Ĝis hodiaŭ gvidan funkcion en la religia Eo-fakmovado plenumas *Marie-Louise (Marilu) Münger-Ackermann* (*1945) en Môtiers/NE. Ŝi organizis la KELI-kongreson en Le Louverain/NE (1990).



*Fakulinoj:* Tina Peter, Gertrud Weigelt, Barbara Pochanke

Tipe por la Eo-movado estas, ke multaj viroj estis akompanataj de siaj edzinoj dum la e-ista aktiveco. Tiel estiĝis multaj 'Eo-paroj' – jen kelkaj ekzemploj: Antaŭ la unua mondmilito →Wilhelm Haase-Meister en Burgdorf/BE konatiĝis kun *Clara Meister* (+1968) el Hasle-Rüegsau/BE, ambaŭ fariĝis aktivaj e-istoj, poste ili vivis en Olten/SO kaj Chur/GR.
Por Bazelo estas menciindaj apud Samuel Leuenberg kaj *Ida Leuenberg-Burkhard* (+1959) ankaŭ la paro →Hermann Schmutz kaj *Jeanne Schmutz-Saenger* (+1982).
En Aarau loĝis la aktivega argovia e-isto →Hans Hunkeler kaj lia edzino *Ines Hunkeler-Ponzino* (+2002).
Dum sesdeko da jaroj membris en la zurika ES *Elsa Schweizer-Bachmann* (+1985), kiu lernis Eon en 1923 kaj tie konatiĝis kun sia onta edzo Arnold Schweizer. En 1940 *Luise Riedler* akceptis la prezidon de la zurika ES. Alia aktiva membro de la zurika ES de la fino de la 1940aj jaroj nomiĝis *Lina Meyer* (+1980). En Zuriko fariĝis konataj Eo-agantoj kaj agantinoj ankaŭ la juristino *Tina Peter-Rüetschi* (+1993), *Helen Kuder-Mátéffy* (+1976), hungara edzino de Edmund Kuder, la ĵurnalista paro →Arthur Baur kaj *Heidi Baur-Sallenbach* (+2006), sed ankaŭ →Werner Laederach kaj *Martha Laederach-Emmes*, →Fritz Liechti kaj *Hanny Liechti-Kilchhofer* (+1999). *Ida Novikoff* (+1976), rusa edzino de Michael Wittenberg, gvidis Eo-kursojn kaj estis aktiva membrino de SES. →*Maurizio (Maŭro) de Sassi* kaj ties edzino *Helen Reber* (+1996) fariĝis konvinkitaj pacaktivuloj, migremaj kaj sportemaj naturamikoj. →Dietrich Michael Weidmann havas kuban Eo-edzinon, *Nélida González-Fonseca.*
Johann Lutz kaj ties edzino *Julietta Lutz-Parolo,* Paul Scherer kaj lia edzino *Margrit Scherer-Graber,* Franz Brügger kaj lia edzino *Margrit Brügger* formas la integran parton de la lucerna ES. →*Sonja Brun* (*1930), iama lingvo-instruistino kaj emerita komerca sekretariino, kiu lernis Eon en 1946, kunlaboris kun la bazelaj kaj lucernaj e-istoj, SES kaj KCE. En 1962 ŝi organizis kun sia tiama edzo John Catling la 75-jaran jubileon de la lingvo Eo, lige kun la SES-tagoj.



*Rulseĝulino:* Anna Bertha Gerber

La ĉefaj Eo-pioniroj en St. Gallen ankaŭ estis geedzoj: →Hans Kürsteiner kaj *Anna Kürsteiner-Strübi* (+1968), Karl Reutemann kaj

→*Lina Reutemann-Klee* (+1993), kiu estis diplomita mastrumantino.



*Klubaninoj:* Hanny Liechti, Lina Reutemann, Louise Tissot-Martin



*Redaktorinoj:* Perla Martinelli, Gertrud Eggenberger, Erna Döring



*Organizantinoj:* Hildegard Schoch, Margrit Guldin, Marilu Munger

Du trafaj ekzemploj, kie kompletaj familioj okupiĝis pri Eo: En Turgovio temas pri la familio de →Otto Walder kaj *Elsbeth Walder-Guggenbühl* (*1919), kiu estis profesia flegistino. Fakte ankaŭ iliaj du filinoj, *Verena Chaves-Walder* kaj *Ruth Van Puijenbroek-Walder* (*1947) siatempe multe kunlaboris kun la e-istoj.

Post sia translokiĝo de Pollando al Svislando fine de la 80aj jaroj, la kernon de la EK Wil ekformis →Stanisław Pochanke, lia edzino *Barbara Pochanke-Grzywa* (*1944) kaj liaj tri infanoj.

En Romandio, en La Chaux-de-Fonds aliĝis al la Eo-movado pluraj V., i.a. *Emma Crisinel, Mathilde Wolf* (+1970), edzino de Jules Wolf, *Amélie Montandon (Vaucher),* poste ankaŭ *Hélène Berger, Andrée Gacond-Giroud* (*1933) kaj ties fratino *Cosette Sandoz/Cop* (+2001). Ankaŭ la patrino de →Claude Gacond, *Gabrielle Gacond-Lüscher* (+1999), montriĝis tre aktiva kaj helpema e-istino. En Les Brenets/NE loĝas la instruistino →*Mireille Grosjean-Robert* (*1946), kiu iam estis prezidantino de KCE//GEP kaj restis verva Eo-aktivulino. Ŝia filino *Marion Bélisle-Grosjean* (*1975) en La Chaux-de-Fonds iam prezidis la junularon de JES kaj edziniĝis kun Mario Bélisle, e-isto el Kanado, kaj havas du denaskajn Eo-infanojn.



*Familianinoj:* Elsbeth Walder kaj ties filinoj Ruth van Pujienbroek-Walder kaj Verena Chaves-Walder



*Romandinoj:* Yvonne Privat, Cosette Sandoz, Gabrielle Gacond

Dum longa tempo EG Vevey/VD estis vivtenata de la geedzoj Karl Hiltpold kaj *Frieda Hiltpold-Weber* (+1984). La analoga kazo estas Morges/VD, kie Charles Jayet kaj ties edzino *Jenny Jayet-Besson* (+1944) praktike ĝis la morto restis aktivaj e-istoj. S-ino Jayet agadis en la virina asocio de Morges (kiel prezidantino) kaj en bonfara organizo, kiu luktis kontraŭ malsanoj kaj malbona nutrado kaj por ke malriĉuloj ricevu vestaĵojn. Fine 1950 la Eo-paro *Henriko Fischer* (+1960) kaj lia edzino loĝis kiel rifuĝintoj en La Tour-de-Peilz/VD. En la sama urbo loĝis *Gertrud Jehle* kaj vivas Jean-Jacques Lavanchy kun ties edzino *Eliane Lavanchy-Purro* (*1937), ĉiuj e-istoj.

La sloven-devena italino →*Anita Altherr-Perič* (*1928), kiu lernis Eon en 1951, kulture agadis inter e-istoj en Zuriko kaj Ĝenevo. Ankaŭ ŝiaj edzo Hans Altherr kaj filino *Zora Masé* (*1955) estas Eo-parolantoj.
*Florence Côté-Cool* (*1931), kanadanino el Kebekio, kies edzo Gerard Cool instruis Eon en la privata lernejo Ecole d'Humanité en Goldern/BE, oficis kiel svisa UEA-ĉefdelegitino (1979-86).
*Perla Ari-Martinelli* (*1938), la edzino de →Giorgio Silfer, dum multaj jaroj prizorgis la revuon →*Literatura Foiro*, estis prezidantino de SES kaj alimaniere aktivadis en la Eo-movado.



*Instruistinoj:* Mireille Grosjean, Nicole Margot, Eliane Lavanchy-Purro




*Filozofemulinoj:* Danièle Bignens-Volpé, Gisèle Weill-Schneck kaj Lucienne Dovat-Clément

En 1911 la ĝenevano →Edmond Privat edzinigis la francan e-istinon *Angèle Fallot.* En 1926 li divorcis de ŝi kaj duafoje edziĝis tiam al →*Yvonne Privat-Bouvier* (+1977), ambaŭ restis dumvive aktivaj e-istinoj. Neforgeseblaj en Ĝenevo estas →Henri Vatré kaj lia unua edzino *Juliette Vatré-Baudin* (+1937), same →*Madeleine Stakian-Vuille* (+2004) kaj ŝia armen-devena edzo Ardachès Stakian. Ekde la 1960aj jaroj vivas en la ĝeneva regiono la fame konataj e-istoj →Claude Piron kaj lia edzino *Nicole Piron* (*1934). Inter la pli juna generacio de la ĝeneva e-istaro elstaras →Andres Bickel kaj lia edzino *Camille Bickel-Perrin.*



*Funkciulinoj:* Florence Cool-Côté, Annelies Dettling-Ammon, Sonja Brun




*Junulinoj:* Vera Pochanke, Zora Masé, Marion Bélisle-Grosjean

Antaŭ sia forveturo al Francio kunlaboris en Ĝenevo ankaŭ la paro Richard Schneller kaj *Martine Schneller* (*1945), kiu revene al Svislando fariĝis bibliotekistino de CDELI en la urba biblioteko de la Chaux-de-Fonds.
La laboron de la ĝeneva EG La Stelo partoprenis aŭ partoprenas pluraj V.: *Stelle Dubois* (+1974), *Alice Muller-Noguet* (+1986), la bibliotekistino *Anne Marine-Briner* (+2003), la librotenistino *Arlette Di Vetta-Mouron* (*1941), *Christiane Sixtus Pot* (*1937) k.a.
→Familioj



*Ĝenevaninoj:* Arlette Di Vetta, Camille Bickel, Nicole Piron

# W

## *Otto WALDER*
*1912-1988*
## *Elsbeth WALDER- GUGGENBÜHL*
**1919*



Otto W. estis fervojisto (lokomotivestro) vivinta plejparte en Romanshorn/TG.
Li fariĝis e-isto en sia junaĝo (1932) kaj restis duonjarcenton aktiva en la Eo-movado. Sian Eo-'karieron' Otto W. komencis en 1933/35 kiel kasisto de la tiam ekzistanta EG Romanshorn kaj en 1935 ricevis la superan diplomon de SES. En Berno, kie li loĝis inter 1935 kaj 1940, li plenumis diversajn oficojn, i.a. tiun de la prezidanto de la berna EG. 1942-45 kaj 1973-79 li estis prezidanto de SES kaj ekster tiuj periodoj li apartenis al la CK de SES; en 1944, 1948 kaj 1967 li redaktis la bultenon *Svisa Espero* (en 1951 li enkondukis SAEF-paĝon en ĝi), en 1976 kaj 1978-70 li estis redaktoro de *SER* kaj 1940-68 prizorgis la libroservon de SES. Krom de SES, kiu en 1951 nomis lin honora membro, W. estis ankaŭ ano de UEA, ĝia svisa ĉefdelegito (1938-68) kaj komitatano (1952-56). Li apartenis al la LKK de la bernaj UK en 1939 kaj 1947 kaj kunlaboris kun la redaktoroj de la →*Svisa Antologio* (1939). Lia kronologia skizo pri la svisa Eo-movado estis publikigita en la kongreslibro de la 64a UK (Lucerno 1979).
Antaŭ ĉio W. estis grava aktivulo de SAEF kaj IFEF: en 1941 li aliĝis al SAEF, estis ĝia asesoro (1954-63), sekretario (1963-66) kaj komisiito (1969). En 1955 li rolis kiel prezidanto de LKK de la 7a IFEF-kongreso en Zuriko. En 1963 li gvidis la statut-komisionon de IFEF (en 1965 la nova statuto laŭ lia koncepto estis akceptita). En 1964 li servis al IFEF kiel ĝia vicprezidanto kaj komisiito rilate la enkondukon de la Eo-instruado en la landoj apartenantaj al la okcidenteŭropaj ekonomiaj sistemoj kaj de 1968 deĵoris kiel IFEF-kasisto. En 1972 li respondecis kiel LKK-komisiito pri kongreslibro kaj propagando de la 24a IFEF-kongreso en Lugano/TI. En 1973 li lanĉis la SAEF-enketon 'Pri la vivo de pensiuloj'. Kiam en 1974 W. demisiis de siaj funkcioj, li estis honorita per la ora FISAIC-medalo kaj en 1975 nomita honora membro de IFEF. La kulmino de la Eo-aktiveco de W. estis la inaŭguro de Esperantoweg ĉe lia domadreso en Romanshorn en 1965.



Otto Walder diversaĝe



Filinoj Ruth van Pujienbroek-Walder, Verena Chaves-Walder kaj Monika Schär-Walder

La edzino de Otto W., *Elisabeth W.-Guggenbühl* (*1919), loĝanta en Meilen/ZH, estas iama flegistino kaj aktivulino de la

protestanta eklezio. Ŝi lernis Eon en 1943, de 1952 membris en KELI kaj 1980-86 estis prezidantino de la svisa KELI-sekcio. Ankaŭ iliaj filinoj *Ruth van Puijenbroek-W.* (*1947), Winterthur/ZH, kiu prezidis la svisan KELI-sekcion en 1978-81, *Verena Chaves-W.,* Flawil/SG, kaj *Monika Schär-W.,* Eppenwil/LU, parolas Eon.
→Turgovio →Svisa Esperanto-Societo →Fervojistoj →Kristanoj →Familioj

## *Edouard WALDVOGEL*
*1893-1994*





W., kiu kun sia familio translokiĝis al Neuchâtel en 1899, estis diplomito de la neŭŝatela universitato (1912-16) kaj fariĝis protestanta teologo. En Mazamet (Tarn, Francio, 1916-20) li rolis kiel anstataŭanta paroĥestro kaj flegisto de militvunditoj. Poste li laboris kiel pastro en Les Eplatures apud La Chaux-de-Fonds/NE (1920-32), en Sierre/VS (1932-38) kaj en Estavayer-le-Lac/FR (1938-58), kie li prezidis la lokan edukan kaj pedagogian centron. Post sia pensiiĝo en 1958 W. funkciadis kiel pastro en Chez-le-Bart/NE (1958-75). 1982-94 W. vivis en la neŭŝatela maljunulejo Clos-Brochet, suferante multajn jarojn ĉefe surdecon kaj malbonan vidkapablon. W. estis idealisma pacaktivulo kun sinteno kontraŭmilita. Post la armedeĵoro en santaĉmento li partoprenis la laboron de la →Civilservo Internacia, en kies kadro li aktivis en Grizono, Valezo kaj Liĥtenŝtejno (1925). En 1943 li okupiĝis pri 300 internigitaj grekaj soldatoj, kaj post la dua mondmilito li organizis kun →Fritz Liechti kaj →Jules Gilliard la helpagadon favore al malsataj germanoj.



La unuan kontakton kun Eo W. havis en 1905/6 pere de sia patro kaj e-isto *Samuel W.* (1854-1924) en la familia somer-ripozejo Uerikon/ZH ĉe la zurika lago. En 1907/8 W. konscie travivis la Ido-krizon. La duan fojon li kontaktiĝis kun Eo dum la unua mondmilito en suda Francio, sed nur en 1927 li definitive aliĝis al la Eo-movado dum la civilservo en Feldis/GR, dank' al franca e-isto, kiu havigis al li lernolibron. En 1927/28, loĝante en Les Eplatures, W. vizitis Eo-kursojn gvidatajn de Emma Crisinel kaj Charles Rosen, la tiamaj Eo-ĉefaktivuloj en La Chaux-de-Fonds, kaj baldaŭ li aliĝis al la loka EG, kies prezidanto li fariĝis. Kiel Eo-aktivulo W. studis la Eo-historion, ricevis en Soloturno (1931) la superan diplomon de SES por instrui la lingvon, organizis la vesperkursojn por senlaboruloj, gvidis la eksterlandajn prelegojn de la rumana e-isto Tiberio Morariu, mem iom prelegis kaj vaste korespondis kun alilandaj gesamideanoj. La UEA-IEL-skismo en 1936 dume distancigis lin de la movado. Konvinkita de Gilliard, W. reaperis en ĝi en 1944, verkante la „konfeson de reaperanto". Li kolektis monon por la Interhelpa Servo de SES, kiu organizis la sendadon de nutraĵoj al alilandaj militsuferantoj. Kadre de la 32a UK en Berno (1947) li gvidis esperantlingvan diservon en la urba katedralo, predikante pri „Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo" (1a Kor 13/13). Ankaŭ okaze de la 42a UK (Marsejlo 1957) li gvidis la protestantan diservon. Kiel aktiva membro de KELI W. ĉeestis ĝiajn aranĝojn, ekzemple en Rüdlingen/SH en 1953. Sian lastan Eo-diservon li celebris en Malley-Renens/VD en oktobro 1972 kadre de semajnfino de la romandaj e-istoj. En la 50aj

jaroj li ankaŭ aktive apogis la svisan Eo-junularon. W. estis UEA-delegito en Sierre, Estavayer-le-Lac kaj Chez-le-Bart.
Lia nevo *Jean W.* (*1914), loĝanta en Gorgier/NE, lernis Eon en 1959 kaj partoprenis plurajn Eo-aktivecojn en- kaj eksterlande.
→Kristanoj →Neuchâtel

### *Dietrich (Didi) WEIDMANN*
**1960. Loĝas en Zürich*



Post kiam W. en sia lerneja tempo aliĝis al la maoistaj komunistoj KPS/ML en Zuriko kaj sentis sin altirita de la instruoj de Bakunin, en la 1980aj jaroj li partoprenis la maldekstran junularan protestmovadon en Zuriko kiel redaktoro de la gazeto *Brächise* (el kiu poste naskiĝis *Wochenzeitung WOZ*) kaj engaĝiĝis en la konstruado de la Aŭtonoma Junulara Centro AJZ (liajn ĉirilatajn spertojn li rakontis en la aŭtobiografia tagblibro *Archipel Turicum, Tagebuch eines Flüchtlings,* 1979, kaj *Archipel Turicum II. Ein Stück geŝichte der bewegung,* Wettingen 1982). Lige kun tiuj aktivecoj li kunpuŝiĝis kun la polico kaj justico. W. forlasis Svislandon kaj dume ekzilis en Meksikio por duona jaro. Krome li agadis en diversaj ekologiaj movadoj, interesiĝis pri reformoj de la germana ortografio kaj iom politikumis (iam li aliĝis al la Juna FDP kaj en 1990 fondis senpartian movadon por kandidatiĝi por la svisa nacia parlamento, poste li distanciĝis de la partipolitiko). Malgraŭ origina liberigo de la armeo W. tamen trapasis la rekrutan lernejon kaj fariĝis kaporalo, kaj poste definitive eksiĝis el la armeo. En 1982 li konfesis sin adepto de la bahaa religio, kaj ekde tiam li membras kaj aktivas en la bahaa komunumo. W. finis studojn pri ĝenerala lingvo-scienco, germanistiko kaj kompara literaturscienco en la zurika universitato per la licencio kaj la diplomverko *Das Kausativ und das Antikausativ in der gemischten Plansprache Eo* (La kaŭzativo kaj la antikaŭzativo en la miksita planlingvo Eo, publikigita en 1989) kadre de ĝenerala lingvo-scienco de tiu universitato. Post siaj studoj W. komencis labori kiel memstara entreprenisto kaj tradukisto, fondante propran oficejon sub la titolo Weidmann's Mondo Servo Allsprachendienst.




Nélida González-Fonseca kaj Dietrich Weidmann

W. lernis Eon memstude en 1974 en Zuriko por fariĝi tre aktiva movadano. En 1977 li aliĝis al la zurika ES, kies prezidanto li mem fariĝis en 1992. En 1982 li fondis la EG de la zurikaj gestudantoj kaj ĝis 1992 motoris ĝin. En 1992 li starigis en Rheineck/SG la Amikaron E-istan (→Sunhejmo) kaj propagandis la lingvon ankaŭ en Schaffhausen. W. estas iama ano de SEJ, kunfondinto kaj prezidinto de JES, redaktinto de *Esperanto-Jugend* (80aj jaroj) kaj kompilinto de la *JES-jarlibro.* Krom tio li plenumis la taskon de la regiona vicprezidanto de SES por Alemanio (1987-91), kiam tiu ofico estis enkondukita, kaj ekde kelkaj jaroj membras en la SES-estraro. En 1992 li lanĉis la t.n. svisan Eo-Infofonon, kiu sub la telefona numero 156-8482 disponigis aktualaĵojn pri Eo. Krome W. verkis kelkajn lernolibrojn, kiujn li uzadis dum siaj Eo-kursoj (*Fernkurs Esperanto,* 1979; *Esperanto por mondcivitanoj,* 1989), tradukis la *Verdan Biblion* en la germanan lingvon (*Die grüne Bibel,* 1992) kaj kompilis la *unuan*

*Esperantan telefakskajeron* (1993, 2a eld. 1994).
En la internacia Eo-movado W. rolis kiel komitatano A de TEJO (1979-91) kaj kiel ĝia ĝenerala sekretario (1987-89) kaj estis komitatano A de UEA (ĝis 1995). Dum la IJK de TEJO en Raŭmo (Finnlando 1980) li pledis kontraŭ la rezolucia adopto de la Manifesto de Raŭmo far TEJO. Li estis prezidanto de Biciklista Eo-Movado Internacia BEMI (1982-84), estrarano de Bahaa Eo-Ligo (BEL), ano de la svisa bahaa Eo-komitato kaj de la Eo-komitato de la nacia spirita asembleo de la bahaanoj, sed li membris ankaŭ en INOE (1983) kaj ILEI (1992). Kiam la interreto fariĝis populara, W. kreadis kaj funkciigis la retujon sub la adreso www.esperanto.ch. En 2006 li estis elektita kiel prezidantino de SES (kun M. Grosjean li dividas tiun oficon).
En 1991 W. edziĝis al la kuba e-istino *Nélida González-Fonseca;* kun ŝi W. havas du filinojn (Linda kaj Jasmin).
→Zuriko →Junularo →Bahaanoj

## *Jean WENGER*
*1881-1960*



Laŭ la nekrologo publikigita en *Feuille d'Avis de Neuchâtel* W. laboris 22 jarojn kiel instruisto antaŭ ol fariĝi grava politikisto en sia urbo Neuchâtel. En 1921 li estis elektita kiel membro de la urba konsilio de Neuchâtel, al kiu li estis reelektita ok fojojn kaj servis dum 27 jaroj. Kiel membro de la socialista partio en la urba konsilio li estradis, reorganizadis kaj modernigis la politikon, la fremdulpolicon, la publikan instruadon, la buĉejojn k.a. Kiam liaj kolegoj estis mobilizitaj por la armedeĵoro, W., kiu pensiiĝis en 1948, longtempe mem direktadis la urbajn aferojn.
W. fervore disvastigis Eon precipe en la jaroj antaŭ la unua mondmilito, prelegante en sia urbo Neuchâtel pri la nova lingvo, sub la aŭspicio de la komercista societo, aŭ verkante gazetartikolojn. En 1906 li estis elektita kiel prezidanto de la neŭŝatela EG kaj instruis Eon. Dum la 9a UK en Berno (1913) li prezidis la internacian oratoran konkurson. Estante dum 1919-21 ankaŭ prezidanto de SES, li apartenis al la Lingva Komitato kaj al la Akademio de Eo. La nekrologo en *SE* 3/1960 laŭdis lin, ĉar li paroladis Eon flue kaj elokvente. Ankaŭ *Maurice W.* (1913-87), la filo de W., estis metilerneja instruisto en Neuchâtel kaj iom interesiĝis pri Eo. W. estis la onklo kaj Maurice estis la kuzo de Alfred W., kiu multajn jarojn prezidis la neŭŝatelan EG.
→Neuchâtel →Svisa Esperanto-Societo

## *WOLF, familio*
Philidor W. alvenis el Alzaco, kiam tiu ĉi franca regiono estis konkerita de Germanio okaze de la milito de 1870-71. Tiam multaj judaj familioj migris al Svislando, interalie al La Chaux-de-Fonds/NE. Ili parolis la francan kaj la jidan lingvojn. Philidore kreis horloĝan fabrikon, kiun li nomis Auréole. Ĝi troviĝis en la domo, kie estas nun la frandejo Minerva kaj la advokata oficejo de →Maurice Favre, vidalvide de la centra poŝtoficejo.
Philidor eklernis Eon en 1887 helpe de unu el la 5 broŝuroj *Langue internationale de Doktoro Esperanto,* kiun L.L. Zamenhof estis sendinta el Varsovio al la tiama rabeno de La Chaux-de-Fonds. Aliaj judoj samtempe ekinteresiĝis pri Eo ĉefe por doni neŭtralan nomon al siaj horloĝaj firmaoj, kiujn ili starigis post sia alveno al La Chaux-de-Fonds. Inter ili troviĝis Isaac Dietesheim, ankaŭ veninta el Alzaco, la tiama prezidanto de la juda komunumo en La Chaux-de-Fonds, kiu fondis gravan horloĝan fabrikon, al kiu li donis la nomon Movado laŭ la konsilo de lia kolego Philidor W., kiu ankaŭ proponis la nomojn Rado, Universo kaj Eterna al aliaj judaj industriistoj. Isaac Dietesheim havis sep gefi-

lojn, inter kiuj kelkaj kungvidis la firmaon Movado, kiu nun apartenas al usona banko. Philidor havis kvar gefilojn, inter kiuj *Jules W.* (1887-1844), kiu transprenis la direktadon de la horloĝfirmao Auréole.



Jules Wolf

Jules W. fariĝis aktiva e-isto. Li fondis la EG de La Chaux-de-Fonds. Li edziĝis al *Mathilde Weil* (1879-1970), kies patro estis kombisto por edzinoj. Ŝi estis aktiva e-istino kaj feministino. Ŝi verkis la teatraĵon *Patreco,* kiu estis prezentita en la UK en Berno (1913). Post la morto de sia edzo Jules ŝi heredigis al la urba biblioteko de la Chaux-de-Fonds lian Eo-dokumentaron kaj transprenis la prezidadon de la EG. (Kompletigajn informojn vd. fontindikojn).
→Neuchâtel

# Z

## *L.L. ZAMENHOF en Svislando*

Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917), kreinto de Eo, alte aprezis la Svisan Konfederacion, ne nur pro ĝiaj naturbelaĵoj, sed ĉefe pro ĝia politika koncepto: la neŭtraleco estis ideo, kiu okupis la aŭtoron de Eo dum lia tuta vivo. En responda letero al la tiama prezidanto de SES, →Friedrich Schneeberger, kiu invitis la 2an UK al Ĝenevo, Z. esprimis sian plaĉon pri la propono kaj eĉ prognozis gravan rolon de la lando por Eo: „Kara sinjoro! Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj E-istoj decidis inviti la 2an kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj E-istoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas iam la tempon, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta E-istaro.“ Efektive, la unua sidejo de UEA estis instalita en Ĝenevo. En sia *Deklaracio de Hilelisto,* publikigita en 1906, Z. laŭdis la politikan solvon de la kvar alpaj popoloj, kiuj donis al sia ŝtato la neŭtralan „nomon hilelistan“ Svislando.



2a UK en Ĝenevo: Zamenhof, Schneeberger, Privat



La paro Zamenhof, 5a de aŭgusto 1905 en Ĝenevo



Schneeberger, Zamenhof, Cart kaj Privat en Ĝenevo en 1906

Z. vizitis Svislandon entute kvar fojojn.

*Unua vizito en 1905:* Revenante de la unua internacia Eo-kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio), Z. kaj lia edzino Klara unuafoje traveturis Svislandon. La 14an de aŭgusto je la oka horo vespere ili alvenis en Ĝenevo, en kies stacidomo ilin akceptis nemultaj samideanoj, ĉar pri lia alveno oni eksciis nur kelkajn horojn antaŭe. Inter la alkurantoj troviĝis f-inoj Borel, Edouard Mallet kaj Em. Bernard Dubois, patro kaj filo, kaj Théodore Renard, sekretario de SES kaj redaktoro de *Svisa Espero.* Renard gastigis la lacajn gevojaĝantojn en strato Vieux-Collège 6 (tabulo ĝis nun indikas la eventon). Dum la sekva tago - estis

belega vetero - la Zamenhofoj ekskursis kun Renard ŝipe sur la Ĝeneva Lago. En Nyon/VD aliĝis al la grupo s-roj Ferrais, Fleurdelys kaj ambaŭ s-inoj Schenk el Rolle/VD, kiuj estis informitaj telegrafie pri la vizito de la majstro. Post la tagmanĝo en Ouchy/VD Z. fortrajnis de Laŭzano tra Berno, kie Schneeberger kaj Feierabend salutis la paron. Schneeberger akompanis la Zamenhofojn ĝis Thun/BE, poste la majstro daŭrigis sian veturadon al Interlaken, Lucerno, Zuriko, Buchs kaj Vieno reen al Varsovio. Fotaĵo pri Z., farita en Ĝenevo, estis mendebla ĉe la redaktoro de *SE.*




Memortabulo ĉe strato Vieux-Collège 6 (fotis A. Künzli)


*Dua vizito en 1906:* Dum la ĝeneva UK okazinta de la 28a de aŭgusto ĝis la 1a (resp. 6a) de septembro Z. intencis prezenti al la mondo sian doktrinon pri homaranismo. Sed la organizantoj de la kongreso malrekomendis al li fari tion. La seniluziigita Z. unue reagis per hezito ĉu li entute veturu de sia germana kuracloko Bad Reinerz al Ĝenevo. Sed ĉar li volis eviti skandalon, li tamen alveturis kaj anstataŭ mencii la homaranismon laŭnome, li ornamis sian kongresan paroladon en Victoria-halo per klarigoj pri la t.n. „interna ideo de Eo" kaj tiel alimaniere esprimis siajn principajn pensojn homaranismajn. Dum la ekskursa tago, la 30an de aŭgusto, Z. veturis ŝipe al Vevey/VD, kie en la hotelo Trois Couronnes okazis festeno. En Svislando li restis almenaŭ ĝis la 1a de septembro (loĝante denove en la ĝeneva strato Vieux-Collège) kaj poste reveturis tra Bad Reinerz al Varsovio.

*Tria vizito en 1909:* Dimanĉon, la 19an de septembro, revojaĝante de la barcelona UK, Z. kaj lia edzino traveturis Ĝenevon, kie ili haltis dum unu horo. Multaj ĝenevaj e-istoj atendis lin ĉe la stacidomo kaj akompanis lin en la bufedon, kie oni trinkis teon. Poste la paro forveturis en la direkto de Dresdeno.



L.L. Zamenhof  (kun filo Adam) en Berno en 1913

*Kvara vizito en 1913:* En ĉi tiu jaro, Z. ĉeestis la 9an UK en la kazino de Berno, 24-31aj de aŭgusto. Li rezignis pri la malferma parolado, ĉar la antaŭan jaron dum la krakova UK li komunikis al la publiko, ke li ne plu deziras esti la majstro. Anstataŭis lin →René de Saussure. La ekskurso kondukis la kongresanojn sur la Lagon de Thun al Interlaken.
En 1913 Z. ellaboris planon pri kongreso pri neŭtrala religio kaj publikigis prian artikolon en madrida gazeto. Malgraŭ la milito Z. preparis sin por la kongreso de homaranistoj, kiu devintus okazi aŭ en 1916 en Berno aŭ en 1917 en Ĝenevo. Ĝi ne okazis, kaj Z. mem mortis en aprilo 1917.
→Universalaj Kongresoj →Antologio



L.L. Zamenhof (kun filo Adam) en Berno en 1913

## *ZUG*

Kantono en centra Svislando germanlingva (germanlingve: Zug, mallong. ZG: 239 km$^2$, 106'800 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Zug.

Z. povas esti konsiderata kiel urbo kaj kantono, kie la Eo-movado estis kaj estas kvazaŭ neekzistanta. Tamen ne mankis kelkaj provoj diskonigi Eon kaj krei Eo-strukturojn en tiu centrasvisa regiono inter Zuriko kaj Lucerno. La kvina nomaro de SES en 1903 menciis la instituton en Menzingen. En decembro 1911 iu profesoro W. Arnold kaj iu d-ro Herzog okazigis informan kunvenon en Z. kun posta Eo-kurso. En 1912 estis fondita la *EG Fidela Rondo* de iu J. Schlitter. En 1913 Eo estis instruata en la libera katolika lernejo porinstruista en Z. Samjare →Hans Joachim Unger kaj J. Lehner, advokato en St. Gallen, kunfondis la svisan sekcion de IKUE en Z. (hotelo Hirschen).

En 1950 →*Hans Herrmann* (1926-2002) klopodis starigi lokan EG, kiu tamen ne trovis efektiviĝon post lia forveturo al Berno.
La jarkunveno de SES en 1984 okazis en la urbodomo de Z. kaj estis organizita de *Niklaus Weiss* (*1951); ĉi tiu zugano lernis Eon en 1969, 1987-93 oficis kiel svisa ĉefdelegito de UEA, kiel kompostisto de *SER* kaj kiel administranto de Muzika Eo-Ligo. Post tiu jarkunveno estis organizita speciala junulara programo en Unterägeri. En 1992 Weiss eksiĝis el ĉiuj Eo-organizoj kaj transdonis la taskon de la UEA-ĉefdelegito al →*Sonja Brun* (*1930), kiu loĝas en Rotkreuz/ZG kaj kiu plenumis tiun taskon ĝis 2002.

## *ZURIKO*

Kantono en orienta Svislando germanlingva (germanlingve Zürich, mallong. ZH: 1729 km$^2$, 1'273'000 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Zürich (laŭ PIV: Zuriko).

La unuaj zurikaj Eo-adeptoj nomiĝis laŭ la unua nomaro de la e-istoj de SES (1903) W. Ritz, Jakob Keller (Winterthur), Heinrich Jenny kaj Jakob Wolf (Wetzikon). En februaro 1905 la filologo →*Eduard Schwyzer* (1874-1943) prelegis en Z. pri la problemo de la universala lingvo. En la sama jaro oficiale fondiĝis la *zurika* ES, kies ekziston SES aprobis en la sekva jaro. Al la societa komitato apartenis →*Karl Jost* (1876-1952), e-isto de 1903, kaj la bontemplano *K.G. Müller*, kiu malfermis en la urbo sekretariejon kaj vendejon por esperantaĵoj (en Neugasse 31). Alia aktivulo, →*Anton Waltisbühl* (1855-1940), eksa volapükisto, funkciigis la zurikan Eo-konsulejon antaŭ ol li transiris al la Ido-movado. En februaro 1906 →Friedrich Schneeberger el Laufen prelegis pri Eo en Schwurgerichtssaal antaŭ 150 personoj, kaj *Heinrich Fridöri* (1861-1928) sukcesis arigi eĉ 500 aŭskultantojn por sia prelego en Tonhalle. Fridöri, e-isto de 1906, estis pedagogo kaj instruisto en Z., kiu agadis por Eo precipe inter instruistoj; krome li estis prezidanto de la zurika ES, ano de la ekzamena komitato de SES, de la Lingva Komitato kaj redaktanto

de *Svisa Espero* (1909-10) kaj kunlaboris kun la redakcio de la revuo *Esperanto* (UEA). En 1912 li adaptis iun lernolibron de G. Egli (eldonejo Orell Füssli) al Eo. La societo Veritas, asocio por la progresigo de la vera homaranismo (aŭ humanismo), kiu havis pli ol 300 membrojn, decidis adopti Eon.

Dum Schneeberger kaj aliaj aliĝis al Ido, Karl Jost firme defendis Eon kontraŭ la idistaj atakoj de →*Albert Nötzli* (1876-1940), la ĉefa zurika idisto. Fine de 1907, meze en la tempo de la Ido-skismo, estis registritaj 106 zurikaj SES-adresoj.

En 1911 estis anoncita la fondo de EG *Frei-enstein-Rorbas* (prezidanto J.-G. Fritschi), kaj en 1912 aperis *Laborista* EG same iniciatita de Karl Jost.



Anton Waltisbühl

Dank' al la 12-paĝa raporto verkita de *Emil Müller* (1885-1965) ekzistas taŭga fundamento de historia skizo pri la zurika ES (ĝis 1955). Laŭ tiu unika kaj utila dokumento, la *zurika* ES estis fondita la 20an de decembro 1905, kiam Karl Jost, Emil Müller kaj s-ro Lang kunvokis la unuan ĝeneralan kunvenon en Seidenhof sub la prezido de Jost. Ĉeestis 18 personoj. Unua prezidanto fariĝis d-ro Herz, unua sekretario Emil Müller kaj unua kasisto Karl Jost. Kaj kiel Jost notis en la gazeto *Volksrecht,* oni devas konkludi, ke la instigo al la fondo de la ES venis de la bontemplanoj. En la unua jaro 53 membroj aliĝis al la ES, L.L. Zamenhof, Louis de Beaufront kaj Friedrich Schneeberger estis nomitaj honoraj membroj. Profesoro Christaller el Stuttgart prelegis en Schwurgerichtssaal, du kursoj estis aranĝitaj.

Pro la eksiĝo de kelkaj aktivuloj kaj la eksplodo de la Ido-krizo la unua en si mem sukcesa periodo de la zurika ES finiĝis iom malbonŝance. La ĝeneralan kunvenon de la zurika ES en 1908 ĉeestis nur 9 membroj, prezidanto Herz mortis dum la tempo de la milito. S-ro Muschamp sekvis lin en tiu ofico. Ankaŭ la trovado de kunvenejo estis problemo, tial oni vagadis de kafejo al kafejo, de Limmathof al Jura, de tie al Du Nord, poste al Waag kaj fine al la domo de Anton Waltisbühl, kiu evidente klopodis tiri la e-istojn al la Ido-movado. Forlasante la 'danĝeran domon' kaj eksiginte Waltisbühl el la ES, oni reiris al Waag, Jura kaj fine trovis kunvenejon en Weisses Kreuz en Seefeld (ĝin oni devis denove forlasi, ĉar la estro evidente trovis la e-istojn ne aparte profitdonaj). En oktobro oni venigis →Edmond Privat por prelegi en hotelo Pfauen. Malgraŭ granda kaj multekosta propagando ĉeestis nur ĉ. 30 personoj. La parolado estis bonega, sed la efiko nula, skribis Müller. Ĉeestis ankaŭ idistoj, kaj kiel kutime ilia celo estis malhelpi la e-istojn.

Tiam *Edmond Kuder* (1887-1973), kiu loĝis en Hausen am Albis/ZH kaj kiu estis arkitekto kaj abelbredisto kun internacia reputacio, prezidis la zurikan ES dum 1909 kaj celkonscie kontraŭstaris la Ido-minacojn dum la skisma tempo. Lia hungar-devena edzino *Helen Kuder-Mateffy* (1901-76) jam en sia origina patrujo estis aktiva e-istino. En tiu periodo restis 23 membroj, kaj en decembro 1909 oni aranĝis festeton en Weisses Kreuz, kiu bone sukcesis, malgraŭ ke nur 17 personoj partoprenis ĝin. Al la plej fruaj membroj de la zurika ES apartenis *Luise Hüber* (1904-79), Emmy Meyer kaj Gottlieb Walder, kiuj restis fidelaj al la ES ĝis sia morto. Inter tiuj agantoj troviĝas ankaŭ iu d-ro E. Lot, kiu fondis apartan *polan* Eo-societon*,* poste fariĝis profesoro en Pollando kaj konata e-isto. Ankaŭ *Kaspar Strickler* (1870-1958) estis multflanka planlingvano, kiu en 1891 kiel juna instruisto en la zurika kantono dediĉis sin al Volapük kaj prelegis pri tio en Höngg/ZH antaŭ ol en 1906-8 adopti Eon en Seen/Winterthur kaj poste aliĝi al la Ido-movado. Jam pli maljuna, Strickler elektis Occidental-Interlingue kaj faris propagandon por tiu planlingvo. Dum 1910, jaro de aparte furiozaj idistaj atakoj, kiel notis Müller en sia raporto, la ES estis prezidata de *P. Schacht.*

En tiu jaro la eminenta profesoro kaj nobelpremiito (1909) Wilhelm Ostwald (1853-1932) el Leipzig prelegis antaŭ 500 personoj, el kiuj 100 sin anoncis por Ido-kursoj (je la fino restis ŝajne nur 6). Heinrich Fridöri devis ĉie kontraŭstari la Ido-influon. En 1911 Kuder denove fariĝis prezidanto, Jost sekretario, la kunvenoj okazis en restoracio Olivenbaum, poste oni devis plumigri al Des Banques kaj Zürcher Hof. La plej granda publika aranĝo okazis en 1912, kiam s-ro Parrish el Los Anĝeleso (Usono) faris en Tonhalle-paviljono esperantlingvan paroladon kun germana traduko. La raportinto Müller mem aliĝis en tiu jaro al la zurika ES. Paralele al la zurika ES cetere ekzistis ankaŭ *laborista* EG, kiu disiĝis dum la unua mondmilito, ĉar ĝiaj membroj grandparte estis eksterlandanoj. 1912-13 aperadis en *Bürgerzeitung* semajna Eo-rubriko. En tiu periodo la zurikaj e-istoj ricevis 200 informpetojn kaj devis vendi dekojn da lernolibroj. 1913-14 la ES estis prezidata de Fridöri, kaj en 1913 grupo de zurikaj e-istoj partoprenis la UK en Berno, post tiu evento la zurikanoj organizis propagandan vesperon.
En marto 1915 estis elektita →*Hans-Joachim Unger* (1894-1984) kiel prezidanto, sed nur por unu jaro, ĉar evidente li ne kapablis akordiĝi kun la SES-estraro, kiu laŭ li ne sufiĉe bone laboris kaj ne reagis sufiĉe rapide al liaj ideoj. Unger estis tre vigla ĵurnalisto. En tiu momento la zurika ES travivis veran krizon kaj la estraranoj jam diskutis pri ĝia malfondo, sed Schacht pretis transpreni la prezidon. Post la vagado tra kunvenejoj (Brunngasse, Passage) en 1918 oni fine alvenis al Karl der Grosse, kie oni povis resti dum jardekoj, fakte ĝis en la komenco de la 1990aj jaroj.
La jaro 1921, kiam grupo de zurikaj e-istoj partoprenis la UK en Prago, montriĝis sufiĉe fruktodona, kun kvar kursoj gviditaj de Karl Jost kaj *Rudolf Unger* (+1937); la membronombro kreskis de 18 al 35, poste eĉ al 54. Rudolf Unger estis la sekretario de la Svisa Asocio por lingvo komerca internacia, delegito de la bazela Specimena Foiro kaj de Instituto Minerva en Z. Iu f-ino Vetsch tiam estis grava sekretaria helpo por la ES. En 1922 oni organizis paroladon de profesoro d-ro Johannes Dietterle, direktoro de la Eo-Instituto por la Germana Regno, kaj de d-ro Albert Steche, prezidanto de Germana Eo-Asocio. En 1923 estis fondita nova EG en la komerca societo. Laŭ raportinto Müller en 1925 pro la UK en Ĝenevo la intereso pri Eo kreskis, kaj la kunvenoj estis bone vizitataj. En 1926 la ES registris 67 membrojn. La 9an de oktobro 1926 paroladis en Z. Robert Kreuz, ĝenerala sekretario de la Internacia Centra Komitato de la Eo-Movado (ICK). Sekvatage okazis en Z. la ĝenerala jarkunveno de SES kun 60 personoj el 16 grupoj. La membraro de SES altiĝis al 464. Sub la prezido de →Edmond Privat okazis vigla diskuto pri ĉiuj aktualaj propagandaj demandoj, kiel raportetis *Vespera Horo* 10/1926.
Interesan detalon menciis Müller en sia raporto: Dum la gazeto *Zürcher Post* rilatis plej favore al la e-istoj, *Neue Zürcher Zeitung* kaj *Tagesanzeiger* „akceptis ĉion de la idistoj". En 1929 forpasis en la aĝo de nur 25 jaroj *Gusti Höhn,* verva Eo-reklamisto, kiu aperigis centojn da propagandaj artikoloj kaj apartenis al la kunfondintoj de la *Komerca* EG.
E-isto de la 1920aj jaroj estis *Paul Enz* (1897-1991), komercisto, kiu aktivis en kooperativo pri favorprezaj loĝejoj por familioj kun malaltaj salajroj. En 1934 li fondis la kooperativon Wirtschaftsring (WIR), kiu ofertis al metiistoj de mal- kaj mezgrandaj entreprenoj reciprokajn negoc-agadojn. Por la bona funkciado de tiu agado li laboris senpage. Pro lia fidela kunlaboro kun la zurika ES, SES kaj UEA (kies delegito li estis), SES kaj la zurika klubo nomis lin honora membro. Private Enz gastigis multajn homojn, ankaŭ el eksterlando, tial li estis iom konata ankaŭ en aliaj landoj. Ankaŭ lia edzino parolis Eon.
Dum 62 jaroj membris en la zurika ES *Elsa Schweizer-Bachmann* (1889-1985), kiu lernis Eon en 1923 kun supera diplomo. En la zurika ES ŝi konatiĝis kun sia onta edzo, *Arnold Schweizer* (1889-1972), kiu laboris dumvive en la bierfarejo Löwenbräu. Ambaŭ geedzoj plenumis diversajn estrarajn funkciojn en la loka societo, pro kio ili ricevis la honoran membrecon.
Du tre fervoraj aktivuloj de la zurika ES de tiu periodo estis ankaŭ *Samuel Moser* (+1956), komitatano, vicprezidanto kaj protokolanto dum diversaj periodoj, kaj *Her-*


*mann Riedli* (1897-1973), kiu multe engaĝiĝis por la Eo-movado en Z. kaj Winterthur kaj kiu servis al SES kiel ĝia estrarano kaj fakulo pri presado.
En 1930 la zurikaj e-istoj festis en restoracio Waag la 25-jaran jubileon de sia ES. 1931 estis la jaro de la unua Cseh-kurso, neniam antaŭe estis farita tiel vasta propagando. Pli ol 200 personoj ĉeestis la propagandan vesperon en Kaufleuten kaj 90 anoncis sin por kurso. Fine de la jaro la nombro de la zurika ES atingis 78 membrojn. Müller taksis, ke en tiu periodo estis atingita la kulmina punkto de la zurika ES. Komence de 1932 estis organizita nova Cseh-kurso, kiun gvidis Tiberio Morariu. Tamen ili ne estis tiel sukcesaj kiel la kursoj de Andreo Cseh. La kurso kaŭzis deficiton, kiun la membroj de la ES afable eliminis. En oktobro la societo akceptis Mustapha Raden el Javo, junan skolton, kiu faris mondvojaĝon kaj rakontis pri siaj spertoj faritaj en 16 landoj. Ankaŭ Hugo Steiner, fondinto de la Internacia Eo-Muzeo en Vieno, vizitis la societon.
En 1934 nova prezidanto de la zurika ES fariĝis →*Marcel Jaccard* (1902-73). La jaro 1936 estis influita de la diskutoj pri la krizo en UEA kaj la fondo de IEL. La zurika ES subtenis la novan organizon, konsiderante ke UEA ne plu kapablas ekzisti, se la brita, t.e. la plej granda landa asocio, forlasus ĝin. En tiu jaro okazis ankaŭ alparolado de Julio Baghy el Budapeŝto pri esperanta literaturo, kaj en 1937 prelegis →Joseph R. Scherrer el Kalifornio pri la romantika vivo de Holivudo.
Ĉirkaŭ 1939 la zurika ES regule kunvenis dufoje monate, malgraŭ la foresto de militaj deĵorantoj. Inter soldatoj Eo-kursoj estis okazigitaj, kaj en la armeo la lingvo estis propagandata. En 1940 *Luise Riedler* akceptis la prezidon anstataŭ Marcel Jaccard, kiu fariĝis SES-prezidanto. En 1944 *SE* raportis, ke la kunvenoj de la zurika ES estas kontentige vizitataj.
Dum fine de la 30aj jaroj la e-istoj devis kontraŭstari la propagandon de la occidentalistoj, en 1944 la varbantoj de Basic English faris laŭtan bruon, kiuj ĉie aranĝis paroladojn. Malgraŭ tio la lingvolern-programo de Migros inkluzivis Eo-kurson. En 1945 s-ro *Egg* estis elektita kiel prezidanto de la zurika ES. En 1946 oni diskutis pri la esperantigo de Z. kaj decidis ke oni skribu Zürich aŭ Zuriĥo. En 1949/50 →*Werner Laederach-Emmes* (1912-2002) fariĝis nova prezidanto de la zurika ES. Diversaj eksterlandaj gastoj, ekzemple Tadros Megalli el Egiptio, prezentis sin en la societo per prelego (pri tiu prelego la zurikanoj ne estis kontentaj!). En majo oni povis saluti 80 francajn fervojistojn, kiuj survojis al la kongreso en Salzburgo. Revenante, 20 el ili restis tagon en Z. por viziti ĝiajn vidindaĵojn. Fine de 1950 la ES posedis 39 aktivajn kaj 13 pasivajn membrojn. Oni devis bedaŭri la morton de la aktiva membro Paula Sing.
Dum la 1950aj jaroj la zurika ES estis prezidata de *Emil Müller* (1885-1965), membro de 1924. Müller estis ankaŭ ano de la ekzamena komitato de SES, sed precipe li estis konata pro tio, ke li private gastigis multajn Eo-samideanojn.



Anita Altherr-Perič kaj Herbert Hammer

En 1951 →Hans Bipp lanĉis Eo-kurson por fervojistoj, *Ida Wittenberg-Novikoff* (1888-1976), edzino de Michael Wittenberg, gvidis progresigan kurson; dekoj da nordeŭropanoj kaj italoj vizitis Zn. En 1952 la ES perdis Karl Jost, unu el la plej fervoraj (honoraj) membroj. En 1953 forpasis Jakob Wild (62-jara) kaj Ernst Hung (59-jara). En 1954 la ES nombris 49 aktivajn kaj 9 pasivajn membrojn. Dum 1951-61 la popola altlernejo en Z. proponis Eon kiel instrufakon, dank' al la *Koordinitaj Eo-kursoj (KEK),* lanĉitaj de →*Tina Peter-Rüetschi* (1904-93). Ĉi tiuj kursoj estis efektivigataj de *Werner Laede-*

*rach-Emmes* (1912-2002) kaj de →*Fritz Liechti-Kilchhofer* (1913-2001), kiu aŭtoris perkasedan Eo-kurson por komencantoj (finitan en 1983). Liechti malkovris Eon en 1944 kaj aliĝis en 1950 al la zurika ES, kies prezidanto li estis inter 1964 kaj 1992 (1974 honora membro, 1992 honora prezidanto). Laederach alvenis al la zurika ES en 1942, ĝin sekve servis unue kiel ĝia sekretario (1947), poste prezidanto (1948) kaj vicprezidanto (1981-92), en 1962 oni elektis lin honora membro. Kaj Liechti kaj Laederach ludis rolon ankaŭ sur nacia nivelo: Laederach estis dufoje prezidanto de SES (1950-53 kaj 1966-71) kaj delegito de UEA, dum Liechti prezidis la svisan KELI-sekcion (1951-77) kaj redaktis la bultenon *SES-informas* (1991-96). Ambaŭ estis apogataj en sia Eo-aktiveco de siaj edzinoj, *Hanny Liechti-Kilchhofer* (1914-99), respektive *Martha Laederach-Emmes* kaj filino *Susanne Plonner-Laederach*. Alia aktiva membro de la zurika ES de la fino de la 1940aj jaroj nomiĝis *Lina Meyer* (1899-1980); ŝi lernis la profesion de ĝardenistino kaj laboris kiel komerca dungito ĉe la firmao Samen-Müller en Z. La e-istoj nomis ŝin Linjo. Ĝis sia morto fidela al la zurika ES restis ankaŭ la instruisto *Gottfried Kuhn* (1890-1964), treege aktiva e-isto de 1931 pere de Cseh-kurso kaj honora membro de la societo kaj de SES en 1952. Pro la 7a IFEF-kongreso en 1955 alvenis ĉ. 300 fervojistoj al Z. *Manfred Führer* (*1933?) estis SAT-reprezentanto en Z. dum la 50aj jaroj.



Fritz Liechti, Hanny Liechti kaj Werner Laederach

Alia aktivulo kaj honora membro de la zurika ES nomiĝis *Herbert Hammer* (1902-76), kunlaboranto de la iama zurika urba teatro (nuna operejo). Li lernis Eon en sia junaĝo kaj trapasis la superan ekzamenon en 1923; li gvidis Eo-kursojn en Z., verkis kaj tradukis multajn poemojn kaj svisajn popolkantojn; pluraj el ili aperis en la →*Svisa Antologio* (1939), kun kies redakcio Hammer oficiale kunlaboris. En la 70aj jaroj li estis ano de la ekzamena komitato de SES. Li regule vizitis landajn kaj internaciajn Eo-aranĝojn.
Nemezureblan kontribuon al la Eo-movado faris la zurika ĵurnalisto kaj libroaŭtoro →*Arthur Baur* (*1915), ĉefredaktoro de *Der Landbote* en Winterthur (1967-80) kaj honora membro de UEA, kiu lernis Eon en 1930, kaj kiu dumvive estis helpata de sia edzino →*Heidi Baur-Sallenbach* (1916-2006).



Gottfried Kuhn, Heidi kaj Arthur Baur

En 1958 Eon ekŝatis ankaŭ *Hans Bickel* (1905-95) en kurso organizita de la →bontemplanoj. Bickel membris en SES kaj UEA, kies fakdelegito pri kontraŭ-alkoholismo li estis dum 35 jaroj.
1961-64 la zurika ES estis prezidata de *Karl-Heinz Mischler* (1926-83), kiu samtempe redaktis la informilon *ESZ-Gazeteto.* Dum Mischler, kiu 1971-72 estis ankaŭ prezidanto de SES, ofertis t.n. Amikajn Eo-Renkontiĝojn en la restoracio Du Nord ĉe la stacidomo, ĉe s-ino von der Crone grupiĝis tiam la Eo-naturamikoj.
Inter la hungaraj elmigrintoj, kiuj en 1956 ekloĝis en Z., troviĝis la e-isto *István Mórocz* (*1935), kiu tiam estis mezlerneja instruisto, pentristo kaj grafikisto. Li e-istiĝis en 1949 en Budapeŝto, en la 60aj jaroj li instruis Eon en Finnlando kaj Kanado. En Svislando Mórocz aliĝis al la zurika EG kaj SES kaj fondis la eldonejon-grafikejon Mondo, kies servojn li disponigis ankaŭ al la e-istoj. Ĉe li estis kreitaj la grafikaj simboloj de KCE kaj de ties fakoj, la tabuloj por la ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno kaj la ilustraĵoj por di-

versaj eldonaĵoj (ekzemple la kovrilo de la libro *Unesteno* kaj la broŝureto *La vilaĝano de Poltavo*). Mórocz estis delegito de UEA en Z., 1979-80 prezidanto de SES kaj redaktoro de *SER*.

En 1967 elmigris el Jugoslavio al Svisando alia hungar-devena e-isto: →*Emmerich Manner* (1928-98), pli frue nomata Mirko Mamužić. Ĉi tiu maŝinfaka inĝeniero loĝis en *Nussbaumen/AG* kaj ŝanĝis sian nomon*,* kiam li akiris la svisan ŝtatanecon. Manner, e-isto de 1947, ofte prelegis en la zurika ES pri gramatikaj, movadhistoriaj kaj beletraj temoj kaj ankaŭ pri siaj oftaj privataj vojaĝoj.

1959-63 vivis kaj laboris en Z. →*Anita Altherr-Perič* (*1928), sloven-devena italino kun svisa ŝtataneco pro geedziĝo kun Hans Altherr. Ŝi aktivis en la zurika ES kiel estraranino, instruistino kaj redaktorino de la *ESZ-Gazeteto* kaj ĝenerale vivigis la Eo-vivon per kantado, teatrado kaj skeĉoj.

Lerninte Eon nur 70-jaraĝa, *Heinrich Matzinger* (1898-1984), instruisto pri skribado kaj stenografio ĉe la kantona komerca lernejo de Z. (1929-62), membriĝis en la zurika ES, kiu nomis lin honora membro. En 1965 aperis en Z. lia grava lernolibro pri *Universala Eo-Stenografio (Unesteno)*, kiu estis verkita kun →*Johannes Jakob Sturzenegger* (1927-85), alia signifa zurika e-isto. (→Stenografio)



Johannes Jakob Sturzenegger, Walter Sonderegger

Kun Sturzenegger oni ne intermiksu *Walter Sonderegger* (1909-82), trajnestro ĉe la svisaj fervojoj, UEA-delegito en Z. ekde 1957. Li propagandis Eon en la zurika regiono, gvidis diversajn Eo-kursojn kaj aktivis ĉefe en SAEF, kies sekretario (1950-59), asesoro kaj komisiito (1959-72) li estis. Li ofte kaj vaste vojaĝis kaj dum siaj aktivecoj estis akompanata de sia edzino. Lia vivo tragike finiĝis, post kiam li falis en profundan fendon sur la monto Rigi en centra Svislando.

Pere de Sonderegger kaj la kurso de Arthur Baur por fervojistoj Eo estis lernita ankaŭ de *Werner Schaufelberger* (1916-98). Lerninte la profesion de mekanikisto, en 1945 li fariĝis lokomotivestro ĉe la svisaj fervojoj. Kiel membro de SAEF de 1958, UEA-fakdelegito pri fervojoj kaj eldoninto de *Svisa Fervojisto* (1984-96), Schaufelberger, kiu estis dumviva membro de SES kaj ano de la naturamikoj, restas en la memoro kiel fidela helpanto kaj modesta samideano en la zurika Eo-movado.




Werner Schaufelberger kaj Hans Noll

Lia pli maljuna fervojista kolego *Hans Noll* (1903-92) laboris kiel stacidoma oficisto (subĉefo) en Wallisellen/ZH kaj dum pli ol 50 jaroj aktivis ankaŭ en la zurika ES, pro kio SES elektis lin honora membro. (→Fervojistoj)

Komence de la 1970aj jaroj aperis en la zurika ES *Numa Droz-Georget* (1898-1981), kiu estis komercisto lernintа Eon en sia maljuna aĝo. Kiel konvinkita pacaktivulo, portanta la saman nomon de la neŭŝatela liberal-demokrata politikisto Numa Droz (kiu estis prezidanto de la Svisa Konfederacio en 1881 kaj 1887), li propagandis Eon verve kaj laŭ iom nekutima maniero, produktante amason da diversaj varbfolioj, kiujn li dissendis ĉefe al gejunuloj kaj distribuis sur la stratoj de La Chaux-de-Fonds. La Eo-varbilojn de Numa Droz helpis distribui *Hans Gilgen* (*1948), komercisto, tipografia korektisto kaj baptisto, kiu lernis Eon en 1976 kaj vizitis la kunvenojn de la zurika ES.

De la 17a de junio ĝis la 5a de julio 1975 en la centra biblioteko de Z. estis prezentita ekspozio pri Eo.
En 1997 mortis en Z. →*Maurizio (Maŭro) de Sassi,* naskita en 1909 en Z. kiel filo de tiĉinaj elmigrintoj. Kun sia edzino *Helen Reber* (1907-96) ili fariĝis konvinkitaj pacaktivuloj, migremaj kaj sportemaj naturamikoj. En Z., kie li aktivis kadre de la loka grupo, de Sassi estis UEA-delegito.
En 2003 forpasis →*Walter Giannini-Aeppli* en Zollikerberg/ZH, naskita en 1914 en Germanio, iama agrikulturisto kaj poste muzikpedagogo kaj politikisto. Giannini estis ano de SES, UEA, KELI (1965) kaj iam ankaŭ prezidanto de la zurika ES.



Maurizio de Sassi kaj Walter Giannini



Max Abegg kaj Rudi Hauger

En Z. vivas du e-istoj, kiuj kvankam ne (plu) estas movade tiom aktivaj, tamen havas konatecon, eĉ internacian. Temas pri →*Max Abegg* (*1937), kies adreso kiel fakdelegito de UEA pri entreprena ekonomio en Wallisellen/ZH aperas en la jarlibro de UEA ĝis nun. Alia internacie konata e-isto, kiu regule prelegis dum la internaciaj kongresaj universitatoj kadre de la UK kaj kiu estas funkciulo de ISAE, nomiĝas →*Rudi Hauger* (*1930), kiu loĝas en Niederglatt/ZH.



Dietrich Weidmann kaj Rolf Ernst




Informilo *Zürcher Esperanto-Jugend* en 1979

Post la elĉerpiĝo de la malnova generacio de zurikaj e-istoj, la zurika ES falis en la manojn de →*Dietrich Michael (Didi) Weidmann* (*1960), kiu lernis Eon en 1974 kaj en 1977 aliĝis al la zurika ES, kies prezidanto li mem fariĝis en 1992. La iama aktivulo de la maldekstra junulara protestmovado en Z. fondis en 1982 la EG de la *zurikaj gestudantoj* kaj ĝis 1992 motoris ĝin. Ekde kelkaj jaroj, kadre de lia profesia tradukservo Allsprachendienst-Weidmann's Mondo-Servo, je la adreso Akazienstrasse 6, funkcias Eo-libr(ovend)ejo kaj kunvenejo, kiu servas ankaŭ al la bahaanoj.
En Z. laboras kiel kompostisto, varb-tekstisto kaj informdezajnisto *Rolf Ernst* (*1970), post

la vizito de la gimnazio (naturscienca sekcio) kaj de la komerca lernejo en Frauenfeld/TG. rolfo, kiel li estas nomata en esperantujo, fariĝis e-isto en 1988 kaj rolis kiel ano de JES kaj kiel redaktoro de *la svisa kanguruo.* (→Junularo)

Ekde 1993 vivas en Z. *Jan Stanisław Skorupski* (*1938), pola kaj esperanta poeto, kanzonisto kaj plastikisto, kiu produktis literaturajn radioprogramojn ĉe la zurika loka radio LoRa (→Radio) kaj de tempo al tempo kulture kontribuas dum Eo-renkontiĝoj. Laŭ raporto de la zurika gazetaro en 1996 Skorupski estis registrita en la Guiness-libro de la rekordoj, ĉar li produktis per 732 sonetoj la plej grandan sonetan ciklon ene de dek monatoj kaj du tagoj.



Jan Stanisław Skorupski

*Kantono:* Dum iu periodo (1970-80aj jaroj) funkciis loka EG ankaŭ en *Winterthur.* En la 70aj jaroj la fakinstruisto *Momčilo Pavlović* tie estis UEA-delegito. Kun la morto de ĝiaj membroj *Antonio Pellanda,* komercisto, *Eugen Bretscher,* lerneja oficisto, kaj *Vojslav Pytloun* (1924-98), korektisto, ĉi tiu klubo malaperis.

En 1988 mortis en Wädenswil/ZH Theodor Studer (*1907), konata eldonisto kaj ĉefredaktoro de la gazetoj *Anzeiger des Bezirkes Horgen* kaj *Sihltaler.* Li estis ankaŭ ano kaj prezidanto de ŝparbanko kaj de diversaj komisionoj, fondaĵoj kaj asocioj, krome estro de la komnunumo Horgen (1947-58). En la nekrologo de Studer estis notite, ke en siaj junaj jaroj li lernis Eon.